




# AVILESA


## ENHAVO

Januaro - 2001 - N° 25-a  
ASTURIO

- 2....Nia Regiono
- 3....Kial ili volis la pilon?
- 4....Tagoj de la Semajno
- 5....Kanzono de L'Espero
- 6....Denove
- 7....La Paŝtisto kaj la Sorĉita Knabino
- 8....La Ununura Penso
- 9....Mesaĝoj
- 10..La Stranga Afero Ŝarko Brako
- 11..Ĉu Knabo aŭ Knabino?
- 12..Edzo al Edzino
- 13..La Ĵurnalista Kapro
- 14..La Katoj
- 15..Amuzajoj
- 16..Zamenhofa Festo 2000a



# REVUO DE LA AVILESA ESPERANTO - GRUPO



Preĝejo Sankta Maria de Bendones

# NIA REGIONO

(ASTURIO)

Ni ankaŭ povas trovi en la ĉefurbo Oviedo la preĝejon Sankta Maria de Bendones, de la sama tempo ol tiu de Santuyano (Santujano) pri kiu ni jam parolis. Bendones troviĝas proksime de la altaĵo San Esteban de las Cruces (Sankta Stefano de la Krucoj). La reĝo Alfonso la III ordonis cetere konstrui la fonton Foncalada, (prononcu Fonkalada) en la centro de nia urbo. Temas pri ununura enurba - kaj samtempe porpopola-konstruaĵo starigita dum la astura-artstila epoko.

En la urbocentra areo ni havas aliajn artaĵojn faritaj ekde la VIII<sup>a</sup> jarcento ĝis la XVIII<sup>a</sup>: la preĝejo San Tirso (IX<sup>a</sup> jarcento), preĝejo kaj monaĥinejo San Pelayo (Sankta Pelajo) (XII<sup>a</sup>, XVI<sup>a</sup> kaj XVII<sup>a</sup> jarcentoj), la romanika turo de la Katedralo, la antikva orfejo (XVIII<sup>a</sup> j.), preĝejo Santo Domingo kaj San Isidoro (XVI<sup>a</sup> j.), la antikva monaĥejo San Vicente (nun Arkeologia Muzeo; XV<sup>a</sup> kaj XVII<sup>a</sup> jj.), la palaco Santa Cruz (Sankta Kruco; XV<sup>a</sup> jarcento, ) , la palaco San Feliz (Sankta Feliĉa; XVIII<sup>a</sup> j.), la palaco Llanes (XVIII<sup>a</sup> j.; prononcu Janes), la palaco Camposagrado (pron. Kamposagrado; Sankta Kampo), farita de Velarde, la Universitato, de la XVI jarcento, la Urbodomo, de la XVII jarcento, ktp. Ni povas vidi ĉi tiujn iamajn monumentojn meze de la modernaj konstruaĵoj kiuj nuntempe svarmas en la historia ĉefurbo de la asturoj.

La Redakcio

## Estraro de ANTAŬEN

Honora Prezidanto: Nicolás Muñiz

Prezidanto: **Cezaro García**

Sekretariino: **M<sup>a</sup> Luisa Menéndez**

Direktado kaj Desegno

revuo Antaŭen: **Císimo Rabanedo**

Kasisto: **Luis González**

Bibliotekistino: **M<sup>a</sup> Isabel Murillo**

Gekomitatanoj:

**M<sup>a</sup> José Alvarez Faedo**

**David Menéndez**

**Eva González**

**Gene Alvarez**

**Lisa Ejarque**

**Daise Murillo**

Nia adreso :

Llaranes Poŝtokesto 51

AVILÉS Asturias

Tfn 98 554 11 27

antauenavilés@hotmail.com

Depósito legal:

Nº AS 1398 (9)

N.I.F. 33677378

Subvenciita per la Registaro


de la Avilesa Municipo

## KIAL ILI VOLIS LA PILON?

Wilhelm Köning, aŭstra sciencisto, trovis en irana kuŝejo de la 3<sup>a</sup> jarcento antaŭ Kristo malgrandan tuboforman objekton farita el kupra lameno. Ĉi tiu estis veldita per kunfando el plumbo kaj stano kaj ĝiaj ekstretoj troviĝis sigelitaj de kovrilo el kupro kaj alia el gudro. Laŭ Köning, se la cilindron oni plenigas per vinagro aŭ vino ĝi produktas elektron.

### De la pomo al la fenestro

Dum li estis membro de la parlamento, Isaac Newton faris nur unu intervenaĵon, kaj ĝi estis por peti ke iu malfermu fenestron.



DASSE

# Tagoj de la Semajno<sup>1</sup>

Kiam oni parolas pri la unua tago de la semajno, la anglosaksa kulturo konsideras ke ĝi estas dimanĉo; la mediteraneaj landoj diras que ĝi estas lundo kaj por la muzulmanoj, ĝi estas sabato. Defini tion kio estas tago ne estas facila, ĉar la koncepto de tago kiel dudek kvar horoj estas moderna, kaj multaj lingvoj, anstataŭ adopti tute novan vorton por priskribi tiun periodon, daŭre uzis la vorton "tagon" - kiu, por plimultaj el ili komencis kiam la suno aperis kaj, do, ĝia daŭro variis je la malsamaj epokoj de la jaro.

L'anglaj kaj germanaj nomoj por la tagoj de la semajno devenas el Skandinavio (vidu la trian kolumnon de la suba tabelo), kie origine kvin-taga semajno estis uzita. La Skandinavoj bazis sian mitologion sur la greka kaj la romia - tiel, Woden kaj Merkuro ambaŭ estis dioj de la milito, kaj Friggs kaj Venero, ambaŭ diinoj de l'amo. Hodiaŭ, en Islando, Svedio kaj Danio, sabato ankoraŭ estas konata kiel "ban-tago" (*Laugardagur, Loerdag*), ĉar kelkaj triboj ne povis trovi teŭtonikan ekvivalenton por la romia honorado al Saturno - la dio de la agrikulturo. La problemo estis solvita kiam ili vidis ke la romiaj soldatoj baniĝis je tiu tago!

La sep-taga semajno devenis el okcidenta Azio, ĝi disvastiĝis al Eŭropo, kaj poste al norda Afriko. En aliaj partoj el Afriko, oni trovas tri-/kvar-/kvin-/ses-/ kaj ok-tagajn semajnojn. La nombro de la tagoj korespondas al la nombro de malsamaj merkatoj je malsamaj tagoj en unu areo; fakte, konga vorto por "semajno" estas la sama kiel por "merkato".

Ne ĉiuj lingvoj havas specialajn nomojn por la tagoj de la semajno. En aliaj multaj Afrikaj lingvoj, ekzemple Svahila, ili simple diras "unua tago", "dua tago", ktp. Tamen, ilia unua tago ne ĉiam korespondas al nia unua tago, kaj ĝi ofte estas sabato. Plimultaj antikvaj civilizacioj - egipta, babilona, majaa, ĉina, ktp. - ne havis koncepton de semajno, kontraŭe, ili havis ciklojn de tagoj - dudek tagoj por la majaa kaj la aztekaj, anstataŭ la Europaj sep tagoj.

Tagoj de la Semajno						
Germana Lingvo	Angla Lingvo	Escandinavia Lingvo	Latina Lingvo	Franca Lingvo	Hispana Lingvo	Esperanto
Montag	Monday	Lun'Tago (Moon)	lunae dies	lundi	lunes	lundo
Dienstag	Tuesday	Twil'Tago (Milito)	dies Martis	mardi	martes	mardo
Mittwoch	Wednesday	Woden (milito, morto)	dies Mercurii	mercredi	miÉrcoles	merkredo
Donnerstag	Thursday	Thor (tondro)	dies Iovis	jeudi	jueves	jaudo
Freitag	Friday	Frigg/ Freya (amo)	dies Veneris	vendredi	viernes	vendredo
Samstag	Saturday	Saturn'tago	Saturni/ sambati dies	samedi	s'bado	sabato
Sonntag	Sunday	Sun'tago	dies solariis (Dominus)	dimanche	domingo	dimanco

*María José Alvarez Faedo*

<sup>1</sup> Por pli da informacio, vidu Wallwork, A. 1999: *The Book of Days*. Cambridge, Cambridge University Press.

## ★KANZONO DE L'ESPERO★

La espero estas nia patrin' en la horoj de la viv'  
kiam la animo genuas tremanta pro la emoci'  
Ĝiaj piecoj kun kares' estas balsam' sur la vund'  
Malfermita porĉiame de korsercâ neplenum'


Nia espero estas sankta, ŝajnas amema hirund'  
Al olda nest' revenanta, tiu ĉiam annovul'  
Ĝi estas la lum' randotransa kiam ekas la tagiĝo  
Blindumante al ni la okulojn per fulgoro de magio

Kvazaŭ halto sur la vojo, kvazaŭ sonĝo en la  
ripozo

La militanto rifuĝas en patrina akceptem'  
Kaj ridetas kvazaŭ ĉielo iĝanta en akvo reflekt'  
Renkontante sin logita per rido de kristalec'



Verkis Luis Menéndez Lumen  
Esperantigis M<sup>a</sup> Luisa Menéndez



# DENOUE

Karaj esperantistaj geamikoj:

Pasis sep jaroj ekde januaro 1994, same kiel ekde la naskiĝo de mia nepino. Mi skribis pri ĝi en nia revuo numero 11<sup>a</sup>.

estis


Sed mi

de Avila,  
religia

“Se vi ne  
kaj la

Tiam

mi



De post tiu tempo mia komunikado interrompita kaŭze de mia malsano. legis en verkaĵo de Salvador Pániker (hispana filozofa) citaĵon kiu apartenas al frazo de Sankta Teresa kiu diris al siaj filinoj de la karmela ordeno.

decidas gluti unu fojon la morton mankon de sano, nenion vi faros”

mi, evitante la malkvietecon kiu al kaŭzas mian malsanon, decidis reveni kun vi ĉiuj, kvankam ĝi nur estu kiam la sano permesas al mi. Ĉar mi estas konvinkita pri la taŭgo de

Esperanto, ĝi estas io pli ol rimedo por nia interkomunikado; ĝi estas idealo pro frateco, konkordo kaj romantikismo, kiuj, interalie, nutras la animon.

Kun vi ĉiuj, kare,

OLGA PEÑA

## LA PAŜTISTO KAJ LA SORĈITA KNABINO

Iun tagon de Sankta Johano ektagiĝe, paŝtisto iris en la monton kaj apud fonto, li trovis belegan knabinon. Neniu knabino el la regiono estis tiel bela kiel ŝi. La paŝtisto akompanis ŝin preter unu leŭgo da vojo kaj kiam li aŭdiaŭis al ŝi, la paŝtisto demandis kiu ŝi estas kaj kie ŝi loĝas.

- Mi loĝas ĉi tie proksime de kaverno, kaj mi estas sorĉita knabino. Ĉu vi kuraĝos min malsorĉi?
- Mi neniam estis timema. Kion mi devas fari?
- Mi aperos antaŭ vi tri fojojn, transformata en "Cuélebre", kun rozo ĉe la buŝo. Se vi al mi ĝin demetos vi min malsorĉos. Vi min ne timu kvankam vi vidu min retordi kaj vin minaci. Post kiam li diris ĉi tion la sorĉita knabino eniris la kavernon.

Baldaŭ aperis grandega "Cuélebre" kaj la paŝtisto ektimis. Li ne kuraĝis ŝteli la rozon. Same okazis kiam la monstro prezentiĝis al la knabo la duan fojon. Sed kiam alvenis la tria apero la paŝtisto atingis la rozon kaj la knabino restis malsorĉita. Kaj al la paŝtisto ŝi donacis la trezoron kiun ŝi havis en la kaverno.



Ludoviko

Cuélebre (elparolu "Kŭélebre"): grandega serpento de la astura mitologio


# LA UNUNURA PENSO

La “Ununura Penso” ekestas post la disfalo de la berlina muro (simbole) kaj la disiĝo de la burokrataj diktaturoj (ili neniam estis proletaj) en la orienta Eŭropo. Ĝi kunportas la ideon pri la neekzisto de alia ebla modelo de sociala organizado krom la kapitalismo, por kio ĝi baziĝas sur la agnosko de la Historio (ĉu ĵusa, ĉu antaŭlonge pasinta, pri tio oni ne debatas) kaj malhelpas la kapablecon de la okcidentaj demokratioj naski ideologiajn fluojn alternativaj al la Povo. Ĝi starigas kiel bastiono kaj avalo de la Bonstata Ŝtato (de la instalita konsumismo), malplenigante ĉi lastan pri sociopolitika enhavo kaj igante ĝin administranto de la pasivaj riĉofontoj kaj legitimanto de la laboraj rilatoj per la aplikado de supranaciaj merkataj leĝoj kiuj kontrolas la ekonomipolitikon de la nacioj.

La “Ununura Penso” estas vere la aro da socialpolitikaj kaj nekulturaj rimedoj celantaj atingi la Merkatan Imperion de la grandaj kompanioj, novkoloniismo impulsita de la usona povo kaj apogata plaĉe de la bankaro kaj la egaj preternaciaj konsorcioj de Eŭropo pro sia alta mona fruktodono kaj sia malstabiliganta kosto: la grandan malekvilibron oni translokas al aliaj porĉiamigante la ekspluatadon de la rimedoj kaj la malkaran laborularon de Mondo.

konsorcioj de  
malalta sociale

latitudoj,  
naturaj  
la Tria



DAMEGO



## MESAĜOJ

Dum la pasinta decembro, kiu markis la finon de la 2000 jaro, la 20<sup>a</sup> jarcento kaj eĉ de la 2<sup>a</sup> jarmilo, nia grupo festis la Zamenhofan tagon kune kun la gesamideanoj de la najbara urbo Gijón. En nia lasta paĝo, ni inkludas la programon.

Post peti multe da fojoj ion rimarkante ke, en nia urbo, funkcias Esperanto-grupo, aktuale, ni jam povas spiri trankvilaj ĉar nova aero alvenis al ni. La nuna skabeno pri kulturo de la avilesa urbodomo, prenis sur sin nian peticion kaj... li jam estas preta inaŭguri en nia tre bela Parko Ferrera "memorajn platojn" sur kiuj la loĝantoj povos legi "Paseo del Esperanto" (Promenejo de Esperanto). Kompreneble, ni ĉiuj brilas pro emocio kaj donas al la skabeno niajn plejajn grandajn dankojn.



# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

22a JARKOLEKTO 2001

Informiĝu pri la okazontaĵoj en la nova 3a jarmilo pere de la internacia revuo MONATO. Ĝi raportas el ĉiuj anguloj de la mondo, tra la okuloj de lokaj loĝantoj kaj informos vin pri aspektoj kaj eroj kiujn aliaj naciaj kaj internaciaj revuoj en la mondo preteratentas. En la tuta Esperantujo ĝi estas unikaĵo, la nura revuo kiu plenumas la celon de Esperanto ĝisfunde: informi ne pri, sed per Esperanto.

Mendu la revuon ĉe la eldonanto  
Flandra Esperanto-Ligo  
Frankrijklei 140  
B-2000 Antwerpen  
BELGIO

EUR 32,00




Korespondi deziras:

María Daise Murillo Zaballa  
Kun geesperantistoj de la t.m.

Adreso:


C/ Sabino Alvarez Gendín 9 B – 5º A  
33400 - AVILÉS – Asturias - Hispanio



Niaj Ĝeamikoj:

LA

STRANGA



AFERO  
ŜARKO-  
BRAKO

Nenio egalas la misteron de la Aŭstralia afero Ŝarko-Brako. Ĝi okazis en la jaro 1935, kiam el la gorgo de ŝarko en la Akvario Kuĝi, en Sidnejo, tautita hombrako aperis en la akvujo.

Al kiu la brako apartenis?

Pripensu la hazardaĵojn kiuj okazis:


- Homkadavro (aŭ eble nur parto) estis ĵetita en la maron.
- La ŝarko manĝis ĝin.
- Tiu specifa ŝarko estis kaptita kaj translokigita al la akvario.
- La ŝarko estis kaptita antaŭ ol la brako elgorgiĝis.
- La brako identiĝis per tatuoj kaj fingropremaĵoj - ĝi apartenis al iu James Smith.
- Kopio de liaj fingropremaĵoj troviĝis ĉe la policejo.

Baldaŭ poste, sur boato kiu rondiradis en la maro, troviĝis Reg Holmes, kunkulpulo de Smith. Li fuŝe provis mortigi sin. La policianoj supozis ke Smith kaj Holmes kune faris kontrabandajn krimojn. Sed antaŭ ol ili povis pridemandi Holmeson, li mortis - li estis trovita en sia aŭto, kun kuglo en la kapo. (Ĉu plia murdo - aŭ sukcesa sinmortigo?)

Juĝisto decidis ke nura brako, sen la tuta kadavro, ne sufiĉus por akuzi iun ajn pri la murdo de Smith, sed fine kunkulpulo estis arestita. Tamen, sen Holmes, la cefa atestanto, li ne estis kondamnita.

Do, ĝis hodiaŭ ĉi tiu stranga afero restas nesolvita, enigmo.

Kunlaborantino: **PATRICIA HARKIN**  
Aŭstralia





## ĈU KNABO AŬ KNABINO?



Mi trovis surstrate, kara leganto, bele binditan, ledan sennoman taglibron, plena da skribaĵoj pri diversaj temoj kaj sennombraj kuriozaĵoj. El inter ili, mi elektis la rakonton titolitan: Ĉu knabo aŭ knabino?.

Jen kiel ĝi tekstas:

"La tempo rapide pasas, la homoj maljuniĝas, la manieroj ŝanĝas ĉiu epoko havas ĝian altrudojn rilate al moroj, manieroj, pensmaniero.... La homoj devas alkutimiĝi al novaj diktaturoj de la epoko, kiuj devigas ilin travivi ĉar, male, ili nepre restus ankritaj en pasinteco".

"Mi celas adaptiĝi, eĉ al la astempa horo, kiun mi travivas, kvankam ne ĉiam mi tutplene sukcesas".

"Dum mia juneco (de tio jam multe da akvo pasis sub la pontoj) mia generacio respektis kvazaŭ fervore la decidojn de niaj gepatroj; ĉio kion ili pensis aŭ opiniis estis por ni sanktega. Ni ne kapablis fari ion, kio al ili malplaĉu. Nuntempe ĉio ŝanĝiĝis, tiurilate. La junularo eliras de la patra hejmo por amuziĝi je kiu ajn horo, revenas malfrue, fumas, trinkas alkoholaĵojn, sin vestas per ekstravagancaj kaj eĉ dissiritaj vestaĵoj. Ili ne petas permeson por io ajn. Ili nur agas tion, kion ili deziras. Se la gepatroj ne konsentas, tio ne gravas"


"Antaŭ kelkaj jaroj la junuloj lasis kreski siajn harojn samkiel virinoj, kaj nuntempe ofte videblas iujn el tiuj specimenoj, portantaj longajn harojn; aliflanke, granda nombro da virinoj eltondis siajn hararojn, ĝis punkto ke ili ŝajnas milicaninoj".

La lasta modo por la junularo temas pri ringomanio; estas normale vidi ĉiaspecajn ringojn ne nur pendantaj de oreloj, sed ankaŭ sur brovoj, mentonoj, nazoj... de ambaŭseksaj junaj homoj. Se al tio oni aldonas ke multaj junuloj estas senbarbuloj, okaze neblas scii ĉu tiu homo, kiu estas antaŭ ni apartenas al vira aŭ virina sekso".

Alveninte al tiu situacio mi min demandas: ĉu estonte venos tago kiam ni la homoj flaros unuj la aliajn (kiel hundoj) por scii ĉu "ĝi" temas pri viro aŭ virino?".

DIMANĈEZ

## *Edzo al Edzino*



Ne interesas ke vi malbeliĝis  
pro la vivo, pro la tempo, pro la jaroj.  
Se nia amo estas pli funda, estas pli forta  
estas pli amo, ja pli amo.

Mia sukceso pli kaj pli estas via sukceso  
miaj atingoj ĉiam estas viaj atingoj  
ĉar vi estis je mia flanko dum la lukto  
kaj vi luktis, krom vi amegis.

Ne interesas ke viaj okuloj jam ne brilas  
kial antaŭe kiam vi ĝuis la printempon  
se la esprimo, la signifo de via animo  
miri vivigas, donas vivon.

Ni promenis tra la strato de la vivo,  
kiam vi falis mi vin helpis kiel frato,  
kiel homo, kiel edzo, kiel viro  
kaj ni marŝis ĝis la fino.



Ni promenos tra la vojo de la tempo  
mi jam certas ke vi prenas miajn manojn  
por ebligi la sukceson de la vivo  
iom da resto, tiom da vivo

Teksto kaj muziko: **Julián Hernández**

Kunlaboranto el Kubo



## La ĵurnalista kapro

Estis foje lando, tute verda kaj tre bela, regata de kruelega tigro, mastro kaj sinjoro de la teritorio.

Al tiu lando venis ĵurnalista kapro.

—Ho, kiel granda kaj trafe regata lando! —ĝentile diris la kapro antaŭ la suvereno.

Sed, krom paroli, ĝi devis ankaŭ verki. Do, kun la deziro favore impresi per siaj kronikoj, en unu el ili ĝi diris pri la tigro: “Ĝia vosto estas aristokrata blazono”.

Kaj okazis, kiel okazas en ĉiuj regnoj de ĉi mondo ke, tagon, la urso anstataŭis la tigron.

Longe cerbumis la kapro ĉar, kiel sciante, la urso ne havas voston kaj, konsekvence, ne plu konvenis laŭdi tiun korpoparton, sed male. Do la kapro artikolis jene en sia revuo: “Feliĉe, la nova suvereno malhavas tiun aĉan apendicon, kiun oni nomas vosto”.

Konstatinte tian kontraŭdiron, la elefanto, abonanto de la revuo, protestis ĉe la ĵurnalista kapro.

Kaj tiu cinike respondis:

—Nu, mi konstatas, ke vi komprenas neniom pri moderna ĵurnalismo. Kiam mi laŭdas same ĉiun el la du bestioj, ĉu vi ne vidas klare, ke gravas ne tio, ĉu ili havas aŭ ne voston, sed la fakto, ke ili havas egajn ungojn kaj dentojn.

*Victor Manuel Pérez Perozo, Venezuelo*  
Tradukis: *Liven Dek*



# LA KATOJ

Fervoraj geamantoj, doktuloj plej senridaj,  
Per sama gusto amas, je pleno de l' sezono  
La katojn, fortajn, mildajn, orgojlon de la domo,  
Ĉar same fridotimaj kaj same hejmosidaj

Amikoj de la scio, amikoj de l' volupto,  
Silenton ili serĉas, hororon de l' tenebro,  
Ereb' ilin elektus rajdbestoj de l' funebro  
Se povus ĉi fiero kliniĝi al servuto

Revante ili prenas la noblon de la pozo  
De tiuj grandaj sfinksoj kuŝantaj en ripozo  
Kaj ŝajne ekdormantaj en reb' senfine ajna.

Per sparkoj sorĉaj fajras la lumbo erotika  
Kaj brilaj oraj punktoj, kiel de sablo fajna  
Eklumas en prunelo mistera kaj mistika.



**CHARLES BAUDELAIRE**

Esperantigis **ELGO**

Kunlaborantino: GINETTE GABILLON Francio



Patro: "Kiam mi estas knabo, mi neniam mensogis."

Filo: "Kiam do vi komencis, paĉjo?"

Patricia Harkin (Australio)

Turisto rigardis simioj en zoologia ĝardeno. Afabla bestovartisto diris:

-Venontan semajnon ni ricevos duonsimion el Madagaskaro.

-Ĉu vere? Ĉu la mono ne sufiĉas por iu tuta, miris la turisto.

Sylvia Hamalainen (Finnlando)

Juna paro fiksis rendezuon en la domo de la knabino, kiam ŝiaj gepatroj elhejnigos. Por pli da certeco la knabino unua eniros kaj donon signalon ĵetante moneron. Aŭdinte ĝian tinton sur la pavino, la junulo supreniros.

La knabino tintigis la moneron, atendis, pasis multe da tempo, sed la knabo ne venis. Ŝi perdis paciencon, malsupreniris por vidi kio okazis kaj trovis lin manpalpi la pavinon antaŭ la domo.

- Mi decidis antaŭ ol supreniri ankaŭ preni la moneron.- li komencis senkulpigi sin.

- Sed mi estis ĝin liginta kaj retiris supren.- ekridis la knabino.

Valentin Georgiev (Bulgario)

"Doktoro, doktoro, mi ronkas tiom laŭte, ke mi vekas min mem. Kion mi faru?"

"Dormu en alia ĉambro"

### PETAĴO

Mi petas humoraĵojn el diversaj landoj por Publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)  
Sendu al:

**CÍSIMO R. SIMÓN**

c/ La magdalena nº 26 - 1º D  
C.P.33400 - AVILES

# ZAMENHOFA FESTO 2000 EN GIJÓN

Altestimataj geamikoj kaj gesamideanoj :

Ankaŭ ĉi tiu jaro, kiel kutime, la esperantistoj en la tuta mondo celebros la 141an datrevenon de la naskiĝo de Dr. Zamenhof, iniciatinto de la internacia lingvo Esperanto. La Astura Esperanto-Asocio celebros ĝin laŭ la jena programo:

**Dimanĉo 17a de decembro:**

- 12:00 horo Oferado de florbukedoj en la strato Esperanto.  
12:45 horo Sankta Meso en Esperanto (Preĝejo Sta. Nikolao)  
14:30 horo En la salono de la restoracio "Mesón Valverde", prelegos iu prestiĝa samideano kaj sekve okazos la tradicia bankedo

## ATENO

- 1e Supo el marbestoj (Sopa de marisco)  
2e Miksita Paeljo (Paella mixta) aŭ Hazeolo laŭ astur maniero (Fabada)  
3e Rostita Saŭdo (Cordero al horno) aŭ Tumbaĵo (Solomillo)  
Deserto; pano; trinkaĵoj Prezo 1.400. Esp.  
Postre; pan; vino o agua

Interesaj adresoj: Estrato "Esperanto": Kvartalo el Coto  
Preĝejo "Santa Nicolao": Kontraŭ la strato Esperanto  
Restoracio "Mesón Valverde": Hejoo, 42 (Apud la preĝejo)

Okaze de ĉi tiu ebento, ni havas la plezuron inviti vin partopreni la programon kaj ĝui kun ni agrablan kaj fratecan tagon. Astura Esperanto-Asocio gratulas kaj deziras al vi ĉiuj, gajan kaj feliĉan Kristnaskon kaj sanan, pacan kaj prosperan Novan Jaron 2001a.

Telefonoj por sciigi al ni vian ĉeeston : 985 34 37 30; 985 35 94 07 aŭ 985 36 29 42.  
Dankon!

Muy importante: Teniendo que confirmar las plazas en el restaurante y dada la premura del tiempo, el último día para comunicar la asistencia será el día 13 de diciembre, miércoles, al mediodía. ¡Gracias!